

Venu al nia

Zamenhoffesto 2026

Ni invitas ĉiujn al agrabla kunestado dum la ĉi-jara Zamenhoffesto kaj librofesto:

Loko: Kiezspinne - Oranĝerio,
Schulze-Boysen-Straße 38, D-10365 Berlin

Dato: **Sabate, la 5-an de decembro 2026,**

15:00*-19:00 h

Programo:**

- Malfermo
- Festprelegeto
- Salutvortoj de gastoj
- Prezentado de interesaj libroj (i.a. pri Berlino – De Humboldt Forum al Tiergarten (urbogvidilo) kaj Monda Pupekspozicio)
- Informoj pri JES 2026 kaj IJK 2027
- Via programero!
- Muziko el la konservujo

Dum la tuta tempo de la aranĝo:

- Libroservo

Do, venu amase kaj ĝuu internacian kaj neforgeseblan etoson, pligrandigu vian librotrezoron kaj ĝojigu vian stomakon per kristnaskaj manĝaĵoj aŭ simple babilu kun malnovaj kaj novaj amikoj aŭ kolektu ideojn por kristnaskaj donacoj!

Se vi deziras aldoni specialaĵojn al la manĝotablo (kukoj, kuketoj … estas ofertitaj), bv. kuraĝi! Por ŝatantoj de aliaj manĝaĵoj la kuireja giĉeto malfermiĝos (memservado je propraj kostoj).

Partoprenkotizo**: 5,00** €***, mondonaco laŭ viaj eblecoj (listo kaj „kolektujo“ troviĝas ĉe la enirejo).

Ni vidos nin en Berlino,

Ĝis tiam

Ronaldo

prez. ELBB

Kontakto por aliĝo kaj demandoj pri alvojaĝo aŭ aliaj detaloj: RonaldSchindler@web.de,
tel.: +49 1514 1419673
Aktualajn informojn vi povas trovi sub: https://esperanto.berlin/de/

* preparado ek de la 14-a horo por helpemuloj
** ŝanĝoj de la programo eblas

2026-10-26